

& En kinematografejo:

< Rekante 25 el 41 batoj por strofo, entute 779 paŝoj dum 9 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butikoj, 1931). Baladigis Martin Strid (2017) per sveda polka melodio kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:41> (/soso soso soofilso laso; mimi mimi miirelmi fami; rere TiiSolTi rere TiiSolTi; rere mire doTi LaSo;

(#Rekantaĵe: SoLaSoFa MiSo do ore; miimimi remi fa mi; rere TiiSoTi rere TiiSoTi; rere mire doTi LaSo; SoLaSoFa MiSo do ore; miimimi fami re do o)

)×19)+

(&Strofoj:

,& Unua:

'1 /Veturante en va2gono ; Sur kanapo lamri2sorta ; Vi elspeza2s pli da mono2 ; Por vojaĝ' pli malkomforta,

(×; **Flugu la balada vorto ; alte ĝis la plafono ; Tondre draŝu2 plankon paŝu2 ; Sentu, ĉu en ĝi risorto ; Flugu la balada vorto ; alte ĝis la plafono.**)

'2 Kaj vi ĝuas malpli ĝue ; La pejzaĝon sub tunel' ; Ol sidante senenue ; En la kino sur fotel'!

'3 Tie ĉi amuzaj scenoj ; Vigle pasas sur l' ekran': ; Baptofest' ĉe indiĝenoj ; Meze de Baluĉistan'.."

'4 Tie ĉi amuzaj scenoj ; Vigle pasas sur l' ekran': ; Baptofest' ĉe indiĝenoj" ; Kun pianoakompan'..

,& Dua:

'5 Pli ol ĉarmo de pejzaĝo ; Densa nokto de la kino ; Vin invitas al vojaĝo ; Ĉirkaŭ via.. najbarino.

'6 Sed jen aktuala sceno ; Vigle pasas sur l' ekran': ; "La kaptado de baleno ; En la Norda Ocean'.."

'7 Sed jen aktuala sceno ; Vigle pasas sur l' ekran': ; "La kaptado de baleno" ; Kun pianoakompan'..

,& Tria:

'8 Kvankam peze vi oscedas ; Amalvoke tra l' silent', ; Pruda najbarin' ne cedas ; Al facila tent'!

'9 Nun la lasta aventuro ; Dum aŭtomobilveturo ; De la fama komikul' ; (Harry Bull!)×

'10 Li kondukas propramane, ; Zigzagante kaj senplane ; Grimpas sur la trotuaron ; Kaj renversas ŝtupetaron,

'11 Kiu falas kunpentristo ; En butikon de spicisto, ; Kie tima klientino ; Svenas sur la margarino

'12 Dum alia, – ho hazardo! – ; Krie dronas en mustardo.. ; La spicisto ekkoleras, ; Tiajn ŝercojn ne toleras,

'13 Tuj li kaptas energie ; La pentriston, kiu ie ; Kuŝis mute kaj sen movoj ; En la kesto por la ovoj,

'14 Kaj per lerta piedbat' ; Lin resendas al la strat'.. Intertempe Harry Bull ; Ĉe proksima stratangul'

'15 Evitante lanternfoston ; Pasas sur vaganta hundo, ; Kies li detranĉas voston ; en la daŭro de sekundo!

'16 Sed la hund' – el pura ras', – ; Opinias ĝin kolbas' ; Kajsensplue, sen hezit' ; Manĝas ĝin kun apetit'..

'17 Tiam tremas tra la kino ; Ventroskua ridgargar', – ; Sed.. la ĉarma najbarino ; Havas voĉon de barbar'!

'18 Sammomente, – ne sen kaŭzo, ; Eklumiĝas; estas paŭzo. ; Lampojlumas sunobrile; Kaj vi spertas nun facile,

'19 Ke anstataŭ najbarino ; Kun gracio kaj kun ĉarmo ; Apud vi en tiu kino ; Sidas nur.. ĝendarmo!